

# La nura IJK, kiu gravas

Ne plu atendu. Nun eblas aliĝi por la Internacia Junulara Kongreso, je 11-18 julio 2020! Bonega alirebleco. Rapidega vifio. Granda trinkejo kun frititaj manĝoj kaj noktaj koncertoj. Ĉu vi loĝos lukse, amase aŭ tende, ĉu vi manĝos vegetare, vegane aŭ viande, kaj ĉu vi alvenos fluge, trajne aŭ bicikle, la IJK en Someren bonvenigos vin.

La temo de la 76-a IJK estos 'Toleremo, ĉu senlima?', aŭ pli taŭge 'seksumado, drogoj kaj rokmuziko'. Ni esploros drogpolitikon de Nederlando kaj aliaj landoj, diskutos nian propran verdan festkulturon, kaj multe parolos pri migrantoj kaj rifuĝantoj.

Ankaŭ la tradiciaj amuzaĵoj kiel danckursoj, naĝejo, koncertoj kaj komitatkunsido kompreneble ne mankos.




*Kie dormos vi?*

La unika junulargastejo De Hoof ofertas 248 litojn, grandan amasloĝejon kun profesia kuirejo kaj grandan kampon por tendumantoj. Ĝia unika trinkejo estas perfekte izolita por festi ĝis la nokto-, noktofino.

La organiza teamo celas organizi kongreson alireblan por ĉiuj. Programkotizoj estas ekde €10 por la malplej pagipovaj, tendumi aŭ amasloĝi kostas nur €25, kaj memzorgi facile eblas. Krome estos propra buseto de la buĝeta flughaveno de Eindhoven kaj de tri trajnstacioj, al kiuj konektos organizitaj trajnkaravanoj. Estos senpagaj promenekursoj, kaj fine eblos volontuli por eĉ pli granda rabato.

Ĉu vi volas jam aliĝi? Je sabato la 3-a de aŭgusto malfermiĝos la aliĝilo je [ijk2020.tejo.org](http://ijk2020.tejo.org)!



# Pos-Amiko

Somero 2019, numero 29

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. UEA kontraŭbatalas seksismon en estraro
1. Civito sendas ŝipon al Hormuza Markolo
2. Kongresanoj plendas pri elvido
2. Greziljono organizas kongresojn por ĉiuj
2. UEA kombinos libroservon
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj

## 4. EVENTOJ **KOLOFONO**

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

## UEA kontraŭbatalas seksismon en estraro

La pionira asocio UEA estas ĉiam atenta pri la plej aktualaj evoluoj en la mondo, kaj kompreneble ankaŭ rimarkis pri la nova ondo de feminismo sub la #metoo-flago. En altstatusa kaj stre-sa posteno, kia estas la UEA-estraro, certe leviĝu demandoj pri taŭga kaj respekta intertraktado kaj ekvilibra divido de taskoj kaj povo inter la seksoj. Por eviti ajnajn problemojn, la Komitato de UEA saĝe elektis novan estraron kun nur viroj.

## Civito sendas ŝipon al Hormuza Markolo

La Esperanto Civito, la konata internacia organizo, intencas sendi ŝipon al la Persa Golfo por kontribui al la mara konflikto inter Irano kaj Usono. La organizo esperas, ke ŝipo portanta civitan flagon estu kaptita de irana mararmeo, por tiel tiri atenton al ĝi. Giorgio Silfer, la vickonsulo pri ofendo, klarigas al la Pos-Amiko: "Ŝipo kaptita en la Hormuza Markolo certe kaŭzus internacian akcidenton, kaj se ni estus subjekto de internacia akcidento, ni logike devus esti subjekto de internacia juro. Ni nur bezonas aĉeti taŭgan ŝipeton. Ni jam kontaktis la svisan mararmeon, sed ankoraŭ ne ricevis respondon."

Oficiale la Forumo, Senato kaj Kapitulo de la Civito bezonas ankoraŭ aprobi tiun ĉi planon, sed ili momente tro okupiĝas pri lingva disputo.

## Kongresanoj plendas pri elvido

Al ĉeestantoj de la 75-a Internacia Junulara Kongreso promesiĝis bela lando kun belaj naturo kaj kulturo, sed alveninte la partoprenantoj tuj rimarkas grandan problemon: montoj blokas la vidon al plejparto de la ĉirkaŭaĵo. Anstataŭe la kongresanoj devas pagi multekostajn ekskursojn por iri inter la montoj por vidi la reston de Slovakujo. Ĉu la organizantoj intence metis la montojn ĉirkaŭ la urbeto por pli enspezi per ekskursoj?

La IJK-teamo estis tro okupita per ridado por respondi al niaj demandoj. La sekvontjara IJK-teamo jam sincere promesas, ke ili metos neniujn montojn en la vasta regiono ĉirkaŭ Someren.

## Greziljono organizas kongresojn por ĉiuj

La kulturdomo kaj kastelo Greziljono, konata pro sendiskriminacia informado tutmonda, baldaŭ lanĉos novan iniciaton por subteni malfortajn landajn movadojn. Ĉar la kastela teamo rimarkis, ke diversaj landoj ne havas propran kongreson, ili afable ofertas gastigi ilin en la kastelo: “En julio okazos unue la kombinita Irlanda-Islanda Kongreso, poste la Moldava Kongreso, trie la Albana, kaj fine la Kombinita Kongreso de Andoro, Liĥtenŝtejno, Monako kaj Vatikano.”

La kastelo ankaŭ volas subteni la junularan movadon: “Poste en aŭgusto ni gastigos la IJS-on, poste MIRO-n, kaj ankoraŭ la Ago-Semajnon kaj Mez-Eŭropan Junularan Semajnon. Por ĉiuj el ili ni celis trovi la plej taŭgan ejon, kaj ĉiufoje la respondo estis nia kastelo.”

## UEA kombinos libroservon kaj bibliotekon

La nuntempaj financaj malfacilaĵoj de UEA instigas al pli kreivaj solvoj por ŝpari monon. Unu nova propono estas kombini la kolektojn de la libroservo kaj biblioteko Hektor Hodler al unu kolekto kaj pli aktive forvendi ĝiajn verkojn. Martin Schaeffer: “Eble ni povus kun ĉiu vendita libro doni unu senpagan jaron de korespondado, aŭ vendi membrolistojn el la 1910-oj kiel murpaperon.” Alia ideo por malpligrandigi la kolekton kaj ŝpari transportkostojn estas je la fino de ĉiu Universala Kongreso forvendi la tutan enhavon de la libroservo/biblioteko dum la kongresa aŭkcio: “Eble homoj pretas pagi pli por jarkolekto de La Ĝeneva Esperantisto, se ili timas ke alia persono unue aĉetos ĝin.”

# NEJ-Novaĵoj!

La plej bona kuracilo kontraŭ post-Esperanto-renkontiĝa sindromo estas aliĝi al la sekva renkontiĝo. Sed povas esti malfacile elekti inter ĉiuj paskaj renkontiĝoj, aŭ ĉiuj someraj. Sed unu elekto ĉiam estas facila: de **1-a ĝis 3-a de novembro** veni Nederlanden por KKPS!

Ĉi-jare ni trovis eĉ pli malinteresan lokon ol pasintjare por organizi eĉ pli mojosan semajnfino: **Bodegraven**. Laŭ diversaj konspiraj teorioj la urbeto ne ekzistas. Malgraŭ tio la loko troviĝas en bela verda kamparo inter laĝetoj kaj riveretoj.



*Ĉu tio ĉi estas Bodegraven?*

En KKPS kiel tradicie estos halovena balo, koncerto kaj ekskurso. Dumtage estos diversaj prezentoj kaj kursoj, kaj dumnokte estos trinkejo kun akoholaĵoj kaj fritiĵoj.

Pliajn informojn vi trovos en nia retpaĝo: [kkps.esperanto-jongeren.nl](http://kkps.esperanto-jongeren.nl)

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Fari pli da sporto ne signifas spekti piedpilkon sidante sur sofo.

**Taŭro:** Malbona vetero? Vestu vian belan novan naĝkostumon sur viaj vestaĵoj!

**Ĝemeloj:** Manĝu pli da fibro kaj malpli da vitro.

**Kankro:** Se mankas al vi mono, demandu en la trinkejo pri hieraŭa nokto.

**Leono:** Ĝuu la vivon: ŝmiru vian patkukon je ambaŭ flankoj.

**Virgulino:** Post 'orientslovaka ĉarmulino' vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi malkovros, ke pli plaĉas ekskurso ol kurso.

**Skorpio:** Vi erare iris al Slovenujo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Léon kaj Tomáš:** Se vi volas plu organizi IJK-on, konsideru iĝi nederlandano.

**Sagitario:** Se vi ne aliĝas al IJK 2020, kion vi vere faras per via vivo?

**Kaprikorno:** Atentu pri sovaĝaj elefantoj dum montara promenado.

**Akvisto:** Ne timu tiri atenton al vi, tiel vi eble aperos en Kartoĵoj kontraŭ Esperantujo.

**Fiŝoj:** Slovakoj certe ne rimarkus, se vi kunportus unu monton hejmen.